

Peter Huchel,

## Sovaĝa kaŝtano

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĝi ne manĝeblas, sed ĝi knalas,  
se oni enfajrigas ĝin;  
aŭtune, kiam ĝi defalas,  
infanoj por ĝi klinas sin.  
Ĝi pendas en pikila ŝelo,  
tro fore por malgranda man',  
ŝirmite sub folia stelo,  
ne povas pluki ĝin infan'.

Sed kiam en aŭtun-vetero  
ŝtorm' skuas arbojn ĝis kulmin',  
kaj araneoj tra l' aero  
de l' vento forportigas sin,  
eksaltas pilkoj de kaŝtano  
de ĉiuj branĉoj de l' ale',  
pelite de la venta mano  
ruliĝas jen sur la ŝose'.

*Traduko de la Germana poemo "Wilde Kastanie" de PETER HUCHEL (\*1903-04-03 – †1981-04-30) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-06-02.*

*MR-420-1a / Arg-284-578 (2005-02-12 23:29:16)*